HEROLDO DE ESPERANTO

Eldono: *Flandra Esperanto-Instituto, P. v. Humbeekstr. 3, Brussel-West.*
Redakcio-Administracio: *T.Jung, Harstenhoekweg 223, Scheveningen, Ned.*
Abonkotizo por la kuranta periodo (januaro-septembro 1947 = 9 monatoj): *Belgujo 100 fk., Nederlando 5.50 gld., cetere 2.50 dol. aŭ 10 angl. ŝil.*
Anoncetoj : *20 komencitaj vortoj aŭ mallongigoj b. fk. 20.—, gld. 1.— ktp.*

DUONMONATA INTERNACIA ORGANO DE LA ESPERANTO-MOVADO

N-ro 5 (1064) | FONDITA EN 1920 — 23-a JARKOLEKTO | 1 Marto 1947

Krom malsato — la frosto.

Delonge Eŭropo ne havis tiel longdaŭran frostperiodon. Nun montriĝas la konsekvencoj de la malbonago en sia tuta amplekso kaj efiko. La fatalo, kiun defiis Furero, senkatenigante en somero 1939 la militmonstron, nun sin venĝas terure.

Kaj la malbonaj konsekvencoj trafas ne nur la landojn iam faŝistajn, kiuj komencis la militon, kaj la vasalojn, kiuj sekvis en ilia vojsulko, kvankam en tiuj landoj ili akceptis la plej severajn formojn ; sed eĉ t.n. venkintoj devas en tiuj ĉi monatoj lukti kontraŭ malabundo de nutraĵoj kaj karboj, kaj de multspecaj aliaj malfacilaĵoj.

Feliĉe, baldaŭ estos printempo, kaj venos nova espero en korojn frostantajn kaj jam malesperontajn.

Sed ĉu la popoloj kaj gvidantoj lernos el la nunaj spertoj por la estonteco ? Sen la militо, pano kaj karbo ja estus nun abunde en la mondo ! La respondo devus esti ne malfacila.

****

VERDSTELAJ RADIOJ.

— La *petskribon al UNO* subskribis ĝis la jarfino 1946 entute 210.310 personoj, inter ili la Prezidanto de la Franca Respubliko, s-ro Vincent Auriol. La kolektado de subskriboj daŭras.

— Al la *32-a Universala Kongreso en Bern* aliĝis ĝis nun proksimume 600 personoj.

— Esperanto-Instituto de Finnlando aranĝos *someran Esperanto-kursaron en la Popola Altlernejo en Jämsä* la 20.— 30.7.1947. La kursloko estas atingebla per vagonaro ĝis Lahti, de tie per vaporŝipo sur romantika lago Päijänne ĝis Jämsä.

— Sveda Esperanto-Federacio decidis, je sia kosto pagi la vojaĝon al Francujo kaj la restadon dum la *Ĵamboreo* en somero 1947 por du svedaj Esperanto-skoltoj.

— Kongreso de Svisa Esperanto-Societo okazos la 15.-16.3. en *Luzern*, kun ekzamenoj, distra vespero, ĝen.kunveno ktp.

— *Brita kaj Alilanda Biblia Societo* vendis ĝis nun 9550 ekzemplerojn de la kompleta esperantlingva Biblio.

— *Ĉeĥoslovaka Ministerio por Informado* skribis al Sveda Esperanto-Federacio esperantlingvan dankleteron pro la helpo de la federacio al ĉeĥa prelegvojaĝinto J. Vitek.

— Svisa Esperanto-Societo sendis en 1946 *helpkestojn* kun 85 kg. da varoj al Vieno, krome ĝi sendis paketojn kun vestaĵoj al Finnlando, oficejajn paperaĵojn al Jugoslavio kaj librojn al Francujo, Belgujo, Nederlando, Polujo, Finnlando kaj Aŭstrio.

— La Stokholma Pacasocio (Stockholms Fredsförening) decidis transdoni la *premion por 1946* (812 kronojn) el la fondajo de Josefina Larsson al nia samideano red. *Harald Thilander* pro lia unika pionira laboro inter la blinduloj de la tuta mondo.

— Esperanto-oficejo de P. Delaire en Orléans organizis konkurson por francaj lernantoj de Esperanto, kies premio konsistas en *senpaga vojaĝo al la Berna Kongreso.*

— *La morto forrabis de ni* la jenajn samideanojn : *J. Borel* en Vaumarcus, Svislando (en pli fruaj jaroj konata Esperanto-eldonisto) ; *Matti Avinen* en Kurikka, Finnlando ; *Fleming Fulcher* en Barnstaple, Anglujo. Vidu specialajn nekrologojn pri s-ro *Lanti* en n-ro 3 kaj pri Prof. *Jung* en la venonta numero.

Senpaga vizo por Svislando.

Ĉiu kongresano de la 32-a U.K. ricevos senpagan vizon por viziti Svislandon de la svisaj ambasadorejoj aŭ konsulejoj en eksterlando, montrante la kongresan karton. La vizo validas nur por la kongresa tempo kaj la postkongresaj ekskursoj. Notu ankoraŭfoje la adreson : 32-a Universala kongreso de Esperanto, Bundesgasse 20, Bern

Esperanto forte revivis en Jugoslavio

Unua viktimo de l' jugoslava nacio estis esperantisto.

La milito trapasis nian landon. La faŝistaj invadintoj mortigis kaj bućis centmilojn de niaj homoj, detruis sennombrajn materiajn kaj kulturajn valorojn. La esperantista movado ne estis ŝparata. La 10-an de aprilo 1941 germanaj trupoj eniris la ĉefurbon de Kroatio kaj la centron de la Esperanto-movado en Jugoslavio — Zagreb'on. La saman tagon posttagmeze faŝistaj banditoj penetris en la ejon de Jugoslavia Esperanto-Ligo kaj de la tiama Akademia Esperantista Klubo. Ili dishakis la meblaron, deŝiris la librojn. Preskaŭ la tuta havaĵo de nia movado estis ŝtelita, bruligita aŭ alimaniere ruinigita.

Tamen plej dolorige estas, ke tuj la unuajn tagojn falis en la manojn de la bućistoj multaj niaj gesamideanoj. *La unua viktimo de nia movado kaj samtempe la unua viktimo de nia popolo estis la konata samideano Inĝ. Bude Borjan,* batalinto por la libereco, socia justeco kaj Esperantismo. Sekvis amaso da aliaj. Entute pereis en Jugoslavio ĉirkaŭ duono de la organizitaj esperantistoj, inter kiuj proskaŭ ĉiuj gvidantoj de la antaŭmilita Esperanto-movado. La aliaj batalis kontraŭ la plej granda malamiko de la homaro : unuj kun la pafilo en la mano en niaj arbaroj, la aliaj subtere en la okupitaj urboj kaj vilaĝoj. Nur tute malgranda parteto estis neaktiva, sed eĉ ne unu esperantisto en nia lando aliĝis al faŝismo !

Post la liberiĝo de la lando tuj kolektiĝis la postvivintaj geesperantistoj por reorganizi la movadon. Unue fondiĝis *Kroatia Esperanto-Ligo* kun la sidejo en Zagreb. Hodiaŭ ĝi jam havas pli ol 500 membrojn en Kroatio. Filioj de la ligo fondiĝis en Zagreb, Sušak, Karlovac, Bjelovar, Varazdin, Osijek, Brod, Gjelekovec kaj aliaj lokoj. Iom pli poste organiziĝis ankaŭ *Slovenia Esperanto-Ligo* kun la sidejo en Ljubljana. Ĝi hodiaŭ havas ĉ. 300 membrojn kaj multajn filiajn societojn en diversaj lokoj de Slovenio (Ljubljana, Kranj, Celje, Trzič, Maribor kaj aliaj). Fine la serbaj gesamideanoj kreis sian *Serbian Esperanto-Ligon* kun la sidejo en Beograd. Pli ol 200 gesamideanoj estas ĝiaj membroj. Tiel ni hodiaŭ havas en Jugoslavio tri naciajn ligojn kun dudeko da filioj kaj ĉ. 1000 organizitaj geesperantistoj. La tri ligoj fondis antaŭ nelonge *Jugoslavian Esperanto-Federacion,* kies tasko estas reprezenti la novan, unuecan Esperanto-movadon en Jugoslavio rilate al eksterlando. La fondkunveno elektis kiel prezidanton de la Federacio *D-ron Ivo Lapenna,* univ. docenton ĉe la Jura Fakultato en Zagreb. Vic-prezidantoj estas *D-ro Vuko Jovanovič,* departementa ĉefo de ŝtata malsanulejo, kaj *Vokoun Franjo,* laboristo.

La 15-an de decembro pasintjara okazis en Zagreb la *2-a Ĉefkunveno de Kroatia Esperanto-Ligo.* Ĉeestis persone 136 gesamideanoj. La delegitoj de filioj reprezentis pluajn 225 membrojn, tiel ke entute estis reprezentitaj 361 membroj. Krome partoprenis la reprezentantoj de Slovenia Esperanto Ligo s-anoj Kozlevčar, Mizerit, Jakomin kaj aliaj. Alvenis salutleteroj de Serbia Esperanto-Ligo, de Bulgara Esperanto Asocio kaj de aliaj societoj kaj asocioj.

(Vidu pĝ. 2, kol. 2.)

Dek jarojn IEL

En la februara numero de « Esperanto Internacia » donas la ĝen.sekretario, s-ro C.C. Goldsmith, resumon pri la evoluo de IEL dum la pasintaj dek jaroj. « Kvankam ne ŝajnas tiom longe, » li skribas, « IEL jam ekzistis 10 jarojn. Ĝi travivis eble la plej malfacilan jardekon en la historio de la mondo. Ĝi ne nur travivis periodon, dum kiu multaj pesimistoj eĉ timis pri la daŭra ekzisto de nia movado, sed ĝi estas nun — nur kelkajn monatojn post la fino de la milito kaj kiam ankoraŭ ekzistas ĥaoso en multaj partoj de la mondo — pli forta ol iam antaŭe. »

IEL finis sian unuan jaron (1937) kun 13.487 membroj, el kiuj 2697 individuaj, kaj la dekan jaron (1946) kun 15.760 membroj, el kiuj 5810 individuaj. Tio ankoraŭ ne estas (pri individuaj membroj) la cifero de la antaŭa UEA, el kiu IEL ja elkreskis, en ĝiaj plej prosperaj jaroj. Sed ni estas certaj ke, post la baldaŭ okazonta reunuiĝo kun UEA, kaj post novaj celtrafaj aranĝoj kaj streĉadoj, la komuna ĝenerala organizaĵo atingos rezultojn, pri kiuj ni ĝis antaŭ nelonge apenaŭ kuraĝis revi.

La sukceso de IEL estas ĉefe dankota al la akurata kaj fidinda laborado de ĝia centra oficejo, sub la gvidado de ĝia ĝen. sekretario s-ro Goldsmith, sed ankaŭ al la fideleco de granda parto de la membraro, kiu eĉ dum la milito ne forlasis la ligon kaj kiu post la milito formis la kernon, el kiu povos evolui pli kaj pli potenca organizaĵo en la estonteco.

Ankaŭ Azio revekiĝas por Esperanto.

En *Singaporo*, alidire en Malajo, kaj sur la sudmaraj insuloj (oni skribas al ni) la Esperanto movado antaŭ la milito disvastiĝis iom post iom. En Malajo, Bangkok, Batavio ktp. troviĝis Esperanto organizoj. Sed dum la regado de l' japana imperialismo nia movado estis detruata. Multaj bravaj samideanoj mortis, aŭ estis kaptitaj, en la kontraŭjapana batalado. La perdo estas nekalkulebla.

Unu el la viktimoj estis s-ano Hou Chio, malnova, ĉiam laborema kaj entuziasma pacbatalinto, kiu estis fama en ĉina kultura cirklo. Kaj ni ankaŭ kredas, ke multaj esperantistoj lin konis kaj iam korespondis kun li. Kelkajn tagojn antaŭ la falo de Singaporo, k-do Hou Chio kune kun siaj amikoj rifuĝis al Sumatro, kie li fariĝis terkulturisto por sia vivtenado kaj pro sekureco, ĉar li bone sciis, kio okazus, se la japanaj imperialistoj lin trovus. Lia malfacila vivado en primitiva arbaro Sumatra pasis jar-post-jare ; sed ve, fine, la 16-an de marto 1944, li estis arestata de japana ĝendarmo. Post longdaŭra turmentado li mortis la 23-an de majo samjara en karcero Sumatra.

Por memorigo al k-do Hou Chio, post la milito estas fondita la *Hou Chio Publika Lernejo,* sub gvidado de s-roj Ĉen Jek Šu, Uan Šu Jan, Hujuz (la estro de la plej granda ĵurnalo « Nan Chiau Jit Pao », neniu en la ĉina kultura cirklo ne scias pri li) kaj de aliaj. Inter ĝiaj ĉefaj principoj estas la disvastigo kaj propagando de Esperanto, latinigo de la ĉina lingvo (skribo), kaj indonezia lingvo.

En aŭgusto 1946 kunvenis la Singaporaj gesamideanoj en la Hou Chio Lernejo kaj sukcesis organizi *Esperanto-Rondeton Singaporan.* La 2-an de septembro komenciĝis unua Esperanto-kurso ; instruanto estas k-do Lu Bi. La 14-an de decembro oni publikigis du specialajn eldonaĵojn en la ĉina lingvo, kompilitajn de Hou Chio Publika Lernejo kaj Esperanto Rondeto Singapora okaze de la naskiĝtago de D-ro Zamenhof. La 15-an de decembro okazis en feste ornamita kunvenejo de la lernejo Zamenhof-memorkunveno, ĉeestata de 60 gesamideanoj.

Nun oni preparas grandstilan *Esperanto-ekspozicion* okaze de la 60-jara Jubileo de Esperanto en julio. Pro tio, ke la disvastigo de nia afero en tiu regiono de la terglobo estas speciale grava, nia redakcio kore subtenas la peton de la Singaporaj samideanoj, ke oni alsendu al ili Esperanto-gazetojn, librojn, broŝurojn, faldfoliojn, poŝtmarkojn, ilustritajn poŝtkartojn kaj alian taŭgan materialon. Jen la adreso : Esperanto-Rondeto Singapora, Hou Chio Publika Lernejo, 897 North Bridge Road, Singapore, Malaya.

D-ro A. Mildwurf, Londono :

Arja paralogismo

Ĝia genezo kaj evoluo.

Kio estas *arjo ?* La respondo estas, ke ne ekzistas tia persono. La originа arja lingvo estis disvolvita de popolo de nekonata raso, verŝajne en iu parto de Orienta Eŭropo. De tie ĝi migradis unuflanke al Malgranda Azio, Persujo kaj Norda Hindujo, aliflanke al Okcidenta Eŭropo, devigante la pli fruajn enloĝantojn adopti ĝian lingvon, same kiel la araboj faris en Norda Afriko kaj la hispanoj en Suda Ameriko. La sola ebla difino de arjo estas : *persono kiu parolas arjan lingvon,* kaj germane-parolanta judo havas la saman rajton al tiu nomo kiel ĉiu alia.

Ĉu ekzistas arja kulturo ? La respondo certe estas negativa. La origine arje-parolantaj homoj vivis, kiel jam dirite, verŝajne en Orienta Eŭropo. Ilia kulturo inkludis la uzon de fero, la bredadon de ĉevaloj, brutaro kaj ŝafoj, kaj la kultivadon de tritiko kaj hordeo. Ĉiujn tiujn trajtojn ili certe pruntеprenis de Azio, ĉar la prapatroj de la domaj ĉevalo, bovo kaj ŝafo ne estas indiĝenoj de Orienta Eŭropo, nek la sovaĝaj plantoj, de kiuj devenis tritiko kaj hordeo. Estas ankaŭ pruvite, ke fero estis uzita unue en Sudorienta Azio. La arje-parolantoj ŝajne bone uzis la kulturon, kiun ili pruntеprenis, sed ĝi estis pruntеprenita kaj ne ilia propra.

La pretendo, ke la homaro povas esti dividata je superaj kaj malsuperaj rasoj, estas tiel malnova kiel la homaro mem.

« Naturo kreis la barbarojn malsuperaj, tiel ke ili servu la grekojn kiel sklavoj, » skribis Aristotelo antaŭ dudek-du jarcentoj. Li kredis ke la diferenco inter greko kaj barbaro estas ĝuste tiel granda, kiel tiu inter homo kaj besto. Kaj « barbaro » estis esprimo uzita por ĉiuj ne-grekoj, inkluzive nature de la romanoj. Kiam Romo fariĝis mondpotenco, la romanoj nomis ĉiujn ne-romanojn barbaroj. Hazarde la vorto estas de greka origino, kaj ĝia etimologia signifo estas « balbutulo », tio estas « lame aŭ tute ne parolanta greke ». La rusoj uzis similan esprimon, aludante al la unuaj okcidentaj negocistoj: « njemci », tio estas « muta popolo». Tiel ili ankoraŭ nun nomas la germanojn.

Ĉi tiu « barbara » teorio kencerne la vorton de iu aŭ alia raso estis konstanta trajto en la historio de la mondo. Ĝi estas evidente la produkto de profunde sidanta instinkto kaj instigas rigardi la propran tribon kiel superan al la aliaj, kaj speciale favoritan de Dio aŭ Naturo.

La metodoj uzitaj por pruvi ĉi tiun tezon variis de epoko al epoko, laŭ la stato de evoluo atingita de la ho-

(Vidu pĝ. 3, kol. 1.)

Batalŝipo valoras pli ol 275.000 homvivojn.

Antaŭ la Nurnberga Tribunalo deklaris la persona ekskuracisto de Hitler, Karl Brandt : « Institucioj por frenezuloj kostis ĉiujare 350 milionojn da markoj, kaj tio estis multe por ŝtato, proksimume la prezo de batalŝipo. »

Jen la nacisocialismo sen masko ! Ĉu ne iam oni parolis pri eŭgeniko ?

Brandt estis akuzita pro sia partopreno en la mortigado de 275.000 frenezuloj kaj kriplaj infanoj. Kompreneble li sentas sin senkulpa.

URTIKO.

Greka ministro de instruado rekomendas Esperanto-kursojn en lernejoj.

La Ministerio de Kultoj kaj de Nacia Instruado de la Helena Reĝolando en Ateno eldonis la 2-an de decembro 1946, sub numero 99.727 la jenan « Cirkuleron pri la instruado de la tutmonda helplingvo Esperanto », direktitan al la ĝen.inspektoroj de la elementa kaj mezgrada instruado, al la direktoroj de la pedagogiaj akademioj kaj de la eksperimentaj lernejoj de l' Universitatoj de Ateno kaj Saloniko, kaj al la direktoroj de la lernejoj de mezgrada instruado :

Konsiderante la gravecon, kiun akiras ĉiutage en la civilizita mondo la tutmonda helplingvo Esperanto kaj rememorigante al vi niajn antaŭajn cirkulerojn sub n-roj 55.517 de la 28.10.1929, 65.896 de la 7.11. 1931, 59.433 de la 28.10.1932, 94.066 de la 9.10.1939 kaj 71.639 de la 24.8.1946 pri la instruado de la tutmonda helplingvo Esperanto al la lernantoj de la gimnazioj kaj pedagogiaj akademioj de la ŝtato, ni petas, ke vi faciligu ĉiamaniere tiun ĉi instruadon, kiun akceptis fari tute senprofite profesoroj diplomitaj de Supera Helena Esperanto Instituto de Ateno.

Estas oportune, ke s-roj direktoroj de la supre cititaj (alt)lernejoj klarigu, antaŭ la komenco de la Esperanto-kurso, la altan gradon, kiun atingis en la nuntempa civilizacio tiu ĉi lingvo, kaj rekomendu samtempe al la lernantoj, ke ili sekvu akurate kun amo kaj intereso la instruatajn kursojn.

Krom tio, ni rekomendas al la supre cititaj s-roj direktoroj la legadon de la dumonata periodaĵo « Helena Esperantisto », oficiala organo de helenaj esperantistoj.

La ministro : A. PAPADIMOS

Esperanta Scienca Asocio fondiĝis en Anglujo.

La 4-an de februaro okazis kunveno en la prelegĉambro de la psikologia fako de la Universitata Kolegio en Londono, kiu signas novan etapon en la evoluo de la brita Esperanto-movado. Dudeko da gesamideanoj kunvenis por fondi fakasocion por okupiĝi pri la aplikado de Esperanto en la servo de la sciencoj. Ĉi tiu nova asocio estas nomita *Brita Esperanta Scienca Asocio,* kaj ĝiaj celoj estas, mallonge, okupi sin pri la antaŭenigo de Esperanto sur la scienca kaj teknologia kampoj en Britujo, helpi al vigla kaj fruktodona kunlaboro inter britaj kaj alilandaj esperantistaj sciencistoj, precipe celante la restarigon de la Int. Scienca Asocio Esperantista.

BESA konsistas el ordinaraj membroj kaj Konsilantaro de personoj influaj en siaj respektivaj sferoj, kiuj kunsentas kun la celoj de la esperantista movado kaj estas pretaj doni konsilon kaj apogon pri la koncernaj brancoj okaze de bezono.

PREZIDANTO :

Prof. J. C. Flugel, psikologo, Londona Universitato

VIC-PREZIDANTO :

D-ro D. R. Duncan, redaktoro de farbindustria revuo

KONSILANTOJ :

W. J. E. Binnie, civila inĝeniero

Leŭt. Komandoro Peter Clissold, ĉefadministranto, Pangbourne Marista Kolegio

D-ro C. B. Fawcett, profesoro de geografio, Londona Universitato

T. J. Gueritte, civila inĝeniero

J. H. Hannay-Thompson, ĉefadministranto kaj inĝeniero, Grantham Harbour, Edinburgh

Ernest R. Relf, direktoro, Aeronaŭtika Kolegio, Cranfield

L. G. M. Roberts, Informada Fako, Gasindustrio

HON. SEKRETARIO :

E. D. Durrant, 18 Romeyn Road, London S.W. 16.

Ĉiam pli vigla agado en Italujo.

La revekiĝo de la Esperanto-movado en Italujo fariĝas ĉiam pli vigla. Post la informoj pri la kursoj okazantaj en Torino kaj Trieste alvenis sciigoj, ke ankaŭ en Romo havas lokon kvar kursoj vizitataj de entuziasmaj lernantoj, plejparte universitataj studentoj. En Milano sub la aŭspicio de la komunumo malfermiĝis kvin kursoj vizitataj de 125 lernantoj. Pluraj aliaj kursoj estas anoncataj en Genova, Sampierdarena, Vicenza, Forli, Parma, Napoli, Messina, Ragusa ktp. Multaj propagandaj artikoloj aperis en la gazetaro, kaj de post la fino de la milito jam disvendiĝis preskaŭ 2000 lernolibroj.

Tian Esperanto-Centron ni devus havi en ĉiu granda urbo.

La bildo prezentas la Centron de la Aŭstria Esperanto-Movado en Vieno. Ĝi estas samtempe la vendejo kaj oficejo de la Esperanto-librejo kaj eldonejo « Tramondo ». La klišo, disponigita al ni de « Tramondo », devis aperi jam en la pasinta numero, sed alvenis tro malfrue. La Esperanto-Centro troviĝas ĉe Neutorgasse n-ro 9, Wien I, en la centro de la urbo.

Esperanto forte revivis en Jugoslavio.

(Daŭrigo de sur paĝo 1.)

La kunveno estis granda manifestacio de nia forto kaj unueco. El la raportoj evidentiĝis, ke granda laboro estas farita en la pasinta jaro. Plej bonajn rezultojn montris la societo en Zagreb. Ĝi organizis kelkajn grandajn propagandajn prelegojn, el kiuj tiun de D-ro Lapenna en Laborista Domo vizitis ĉ. 500 personoj. La sama preleganto parolis ankaŭ antaŭ ĉ. 800 oficiroj kaj soldatoj de nia armeo. La societaj kunvenoj estas regule vizitataj de 30-80 gesamideanoj. Ili okazas ĉiulunde en belega, propra ejo. En tiuj aranĝoj partoprenis gesamideanoj D-ro Lapenna, D-ro Jovanovič, Kasovič, Preksavec, Jorgovanič, Nemec, Kolarič, Pačesnovski, Murtič, Rehorič, Ferenčič, Gropuzzo Nada kaj Ivo, Lapenna Emilija, Vajdlih, Antoš kaj aliaj. *Dum la kunvenoj oni parolas nur la internacian lingvon,* kaj la lingva nivelo estas tre bona. Apartan intereson vekas ĉe la membroj la t.n. « Vivaj gazetoj » kun fruntartikolo, kultura, ekonomia, sporta ktp. rubrikoj. Ili estas aranĝataj en la tuta lando, kie ekzistas niaj grupoj.

Menciindaj estas la *kursoj.* En dudeko da urboj estis gvidataj porkomencantaj kursoj. Entute vizitis ilin ĉ. 1400 personoj. Plej brilan sukceson atingis en tiu ĉi jaro la filio (societo) en *Varazdin* sub gvido de nia agema samideano *Vančik.* La kursojn de tiu societo nun vizitas 322 personoj !

La Ligo presigis la trian eldonon de la konata *lernolibro* de D-ro Lapenna, « Esperanto en dek lecionoj ». Ni esperas, ke la tuta eldonkvanto (6000 ekz.) disvendiĝos en tiu ĉi jaro. En du monatoj la novan eldonon de la gramatiko aĉetis pli ol 1000 personoj. Ĉi tie oni devas akcenti, ke Slovenia Esperanto-Ligo publikigis la duan eldonon de la bonega lernolibro de Prof. Rakuŝa. Ĝi ankaŭ rapide disvendiĝas en Slovenio.

Kun permeso de la plej granda verkisto en Jugoslavio, Miroslaw Krleja, aperis la Esperanta traduko de lia unua postmilita verko « Adriatika temo ». La tradukon perfekte prizorgis s-ano Marko Demetrovič.

Provizore ankoraŭ ne povas aperi nia organo « La Suda Stelo », kiu pro sia progresema starpunkto kaj interesa enhavo estis tre ŝatata antaŭ la milito ankaŭ en la eksterlando. Tamen ni trovis solvon. Kune kun la samideanaj asocioj en Bulgario kaj Rumanio ni eldonas komunan revuon sub titolo « Internacia Kulturo ». Ĝi estas reprezenta organo de la demokrataj balkanaj esperantistoj. Interne ni, de tempo al tempo, eldonas litografitan aŭ presitan Bultenon por informi la esperantistojn pri la novaĵoj en la movado. Tuj post la solvo de la « papera krizo » espereble reaperos « La Suda Stelo ».

La ĉefkunveno de Kroatia Esperanto-Ligo akceptis ĉiujn raportojn kaj esprimis sian dankon al agema sekretariino de la ligo s-anino Nada Groppuzo pro la bona laboro. Same oni kun simpatio rimarkis la sukcesojn kiujn atingis la ĉefdelegito de IEL s-ano Kasovič varbante novajn membrojn kaj organizante la delegitan reton en Jugoslavio.

Tagon antaŭ la ĉefkunveno, la 14-an de decembro vespere, okazis en la salono de Laborista Domo brile sukcesinta *Zamenhof-vespero.* Ĉeestis pli ol 250 gesamideanoj (en kelkaj landoj oni tion nomus « kongreso»!). La studenta kantista ĥoro de medicina fakultato malfermis la aranĝon per « La Espero ». Sekvis unu el la plej fortaj paroladoj de D-ro Lapenna. Prezentinte la noblan personecon de la aŭtoro de Esperanto, liajn celojn kaj idealojn, la oratoro transiris al la idea flanko de Esperantismo. Li klare prezentis la kontraŭecon inter la esenco de Esperantismo kaj la faŝismo. D-ro Lapenna akcentis ke inter faŝismo kaj Esperanto ne povas ekzisti stato de « paco » aŭ « indiferenta sinteno ». Tial li akre atakis ĉiun provon kompromiti la altajn celojn de Esperantismo per ia falsa « neŭtraleco ». La organizita movado povas esti neŭtrala, li diris, rilate al politikaj tendencoj, kiuj enhavas pli aŭ malpli da demokrataj elementoj, sed ĝi ne povas esti neŭtrala rilate al faŝismo, ĉar faŝismo ne estas politika tendenco, sed krima aperaĵo. Post la Nurnberga proceso tio devas esti klara eĉ al blinduloj. Esti neŭtrala rilate al krimo signifas, vole nevole, helpi la krimulon kaj lian kriman agadon. Kaj tion ni esperantistoj nek povas nek volas. Tial ni daŭrigos insiste la batalon por plena demokratiĝo de nia organizita movado, konvinkitaj ke tiel plej bone ni povas honori la memoron de tiu nobla kaj granda homo : D-ro Zamenhof.

La parolado de D-ro Lapenna estis kelkfoje interrompita per aplaŭdegoj de ĉiuj ĉeestantoj. Tio klare montras, kiel rigardas la jugoslaviaj esperantistoj al la problemo de neŭtraleco.

Sekvis du recitaĵoj. Ivo Gropuzzo legis parton de unu parolado de D-ro Zamenhof, kaj Ivo Borovečki bonege recitis la faman poemon « Biografio de kamarado Tito » de la konata poeto Radovan Zogovič, tradukita de M. Demetrovič. Fine la kantista ĥoro prezentis kelkajn kantojn. Post la solena parto de la programo oni dancis kaj amuziĝis ĝis noktomezo. En la salono estis aŭdata nur la internacia lingvo, kiu sonĉese kaj ĉiam pli vaste gajnas poziciojn en la nova Jugoslavio.

D-ro I.G.

En Ĉeĥoslovakio kursoj kreskas de leciono al leciono.

Ĉeĥoslovakio prezentas speciale ĝojigan bildon koncerne la Esperanto-movadon. Ne nur ĉeĥaj radiostacioj disaŭdigas ĉiumonate okdekon da Esperanto-dissendoj (samideanoj ĉiulandaj skribu al la stacioj por danki !), sed kursoj okazas en multaj lokoj kaj, mirinda fenomeno, pri pluraj kursoj oni povas raporti, ke la nombro de iliaj partoprenantoj kreskas dum la kursdaŭro. Ekzemple en Česka Lipa komenciĝis kurso kun 9 personoj kaj kreskis ĝis 30 personoj ; en Dobrovice kurso komencita kun 19 personoj finiĝis kun 24 ; en Karlovy Vary okazas du kursoj kun 15 kaj 50 partoprenantoj, kaj ankaŭ tiuj kursoj estas kreskantaj ; kurson en Ostrava-Kunčičky vizitis en la unua leciono 35, sed en la dua jam 42 personoj.

Krome oni raportas pri kursoj en Bojkovice, Č. Budejovice, Brno (2 kursoj), Havlíčkuv Brod, Liberec, Mlade Boleslav (2, el kiuj unu por skoltoj), Haj u Opany, Plzen (3), Pardubice, Radvanice, Tabor (6 kursoj, kune 200 p.), Trebič, Trutnov (por fervojistoj), Turnov, Ujezd u Sokolnic, Usti n.L. (6), Valašské Meziriči kaj Zidenice. En Liberec 1000 personoj vizitis prelegojn de s-ano J. Vitek. Ĉi-lasta gvidas ankaŭ kurson kun 32 p. en Hradec Kralové, kie okazas du aliaj kursoj : por fervojistoj de Fr. Pytloun (12 p.) kaj por komencantoj de s-ano Tuch (35 k.) ; s-ano Pytloun gvidas kurson ankaŭ en urbeto Chlumec (30 p.), kaj s-ano Vondraček en Česka Skalice (22 p.).

La klubo de Hr. Kralové eldonas por siaj membroj kaj amikaro (jam 163 personoj fariĝis « amikoj ») gazetan informilon en ĉeĥa kaj slovaka lingvoj. La 15.3. ĝi entreprenos amuzan kursfinan feston, kies eksterurbaj partoprenontoj havos senpagan tranokton garantiitan. Por la Berna Kongreso la klubo ŝparas en t.n. Fondo de D-ro Vajner : ĉiu partoprenanto en ĉiu kunveno pagas 3 kronojn, tiel ke la vojaĝo al Bern kaj revene por du samideanoj estos pagita.

Ĉiu japana infano legos pri la vivo de Zamenhof.

La Japana Ministerio por Edukado decidis meti en la legolibron por elementaj lernejoj biografion de D-ro L.L. Zamenhof. La biografion verkis s-ano Mijake Šihej, de Japana Esperanto-Instituto. Tio ŝajnas al ni la plej taŭga metodo, por konatigi jam la infanojn pri tiu granda bonfarinto de la homaro kaj pri lia verko. Tia biografio de nia majstro devus troviĝi en ĉiu elementa legolibro de la tuta mondo.

En multaj urboj de Japanujo okazis Zamenhof-festoj okaze de la datreveno de l' naskiĝo de la majstro ; la radiostacio JOAK (Tokio) disaŭdigis en tiu tago paroladon « Zamenhof kaj Esperanto » de Prof. Nishi, ĉefdirektoro de Japana Esp.-Instituto, kaj la stacio JOBK (Osaka) disaŭdigis paroladon « Pri D-ro Zamenhof » de D-ro Yasuda, profesoro de Osaka Imperia Universitato.

Unuigitaj Ŝtatoj de la Mondo.

La 30.1.1947 okazis en Marsejlo, Francio, publika kunveno, organizita de la Franca Komitato por la Unuigitaj Ŝtatoj de la Mondo.

S-ro *Jean Guillibert* el Parizo tre lerte pruvis la neceson kaj prezentis planon por formi tiujn Unuigitajn Ŝtatojn. Li diris : La danĝero de nova milito pligrandiĝas; malamo kaj dividado regas ĉie ; grandaj armeoj ankoraŭ restas mobilizitaj, kiuj nur atendas ordonon ; sciencistoj ĉie laboras por perfektigi atomajn bombojn, bombojn kun mikroboj kaj radiojn mortigajn. La perdo de ekvilibro financa de ŝtatoj pro senlimaj elspezoj iĝas pli granda ĉiutage. Li emfazis, ke por malebligi en plej proksima tempo novan katastrofon, oni devas tuj starigi la Unuigitajn Ŝtatojn de la Mondo, grandan federalan respublikon, kies konstitucio garantios la rajtojn, kiuj estos fundamentaj kaj necesaj al la homoj, tio estas : libereco individua, libereco de konscienco, de asociiĝo, de parolo, de kunvenoj, de laboro kaj de la preso. Egaleco por ĉiuj en civitanaj rajtoj. Landlimoj devas malaperi. Devas ekzisti nur unu armeo, « internacia », kaj nur unu mono. Li rekomendas la alprenon de la doktrino de Abundo por justa distribuado de abundo ĉie, kie estas bezono.

La parolado estis varme aplaŭdata.

S-ro *A. Doerr,* prezidanto de la Marsejla sekcio de la Movado Franca de Abundo, gratulis la paroladinton pro lia klara prezento, bazita sur faktoj, kaj diris, ke la du movadoj devas kunlaboradi por pliboniĝi la ekziston de homoj, kiuj postulas nenion pli ol vivi en paco.

S-ro *H. Bourdelon,* prezidanto de la loka Esperanto-grupo, iris sur la estradon kaj diris ke, kvankam s-ro Guillibert montris la neceson de monda unueco, tamen li nenion diris pri la malfacileco de lingvo. Ĉu tiu organizajo intencas kaose labori en la lingva kampo, kiam ekzistas al ĝia dispono internacia lingvo Esperanto, jam evoluinta por internacia uzado ?

La oratoro respondis, ke la nunaj organizantoj de tiu movado uzas la lingvojn anglan, francan, hispanan kaj rusan.

Tiam s-ro Bourdelon diris, ke ankoraŭ restas la lingva konfuzo, kio nenial taŭgas por internacia organizajo kiel la Unuigitaj Ŝtatoj de la Mondo. Li proponis al s-ro Guillibert la uzadon de Esperanto por internaciaj rilatoj.

En la vestiblo samideanoj vendis bonan nombron da Esperanto-gramatikoj al la forirantoj.

E.E. YELLAND.

« Nederlanda Katoliko » jarkunvenis.

Nederlandaj katolikaj esperantistoj jarkunvenis la 8.—9.2. en Eindhoven. En 1946 kreskis la nombro de la sekcioj de l' asocio « Nederlanda Katoliko » de 13 al 21. Esperanto-kursoj por katolikoj okazas en pluraj urboj. Krome funkcias koresponda kurso, redaktata de s-ro P.A. Schendeler. La prezidanto de N.K., s-ro L.G.C. de Jong, estas ankaŭ redaktoro de la internacia « Espero Katolika », bonenhava, ilustrita kaj bone presita revuo. La venonta jarkunveno okazos en marto 1948 en Hago.

Junularkunveno en Svedujo.

Tuj post la internacia somerkurso en Skövde okazos junularkunveno esperantista la 12.—15.7.1947 en Jursla, apud la urbo Norrköping, en la mirinde bela regiono de Kolmarden. Bonegaj ban- kaj sport-eblecoj. La partoprenontoj loĝos en bonega « esperantista somerhejmo », kaj oni aranĝos malmultekostan manĝaĵon. Bona tendkampo troviĝas por tendemuloj. Kompreneble ekzistas multaj malfacilaĵoj por eksterlandanoj viziti la kunvenon, sed oni faros sian eblon por helpi. La kunvenon aranĝos la Junulara Sekcio de Sveda Esp. Federacio (sveda sekcio de Tutmonda Junular-Organizo). Interesuloj petu informojn de Karl E. Andersson, Jursla 5, *Aby,* Svedujo.

Esperanto-kurso en dana konversacia leksikono.

Unu el la plej grandaj libro-eldonejoj danaj, Westermanss Forlag, eldonos ampleksan konversacian leksikonon (enciklopedion). La redakcia komitato decidis, ke en la leksikono estu Esperanto-kurso por komencantoj en 15-20 lecionoj. Krom la kurso aperos enkonduko pri Esperanto en dana lingvo. Iniciatinto de tio estas unu el la kunlaborantoj de la eldonejo s-ro J. Vesterland-Andersen, Bernstorffsvej 78, Hellerup, Danlando. Li akceptas materialon por la leksikono.

Ĉu unikaĵo ?

Brita leganto sendis al ni la jenan interesan komunikon :

Mi havas esperantistan lernanton. Kiam li decidis eklerni la lingvon internacian, ĉiuj amikoj ekridetis, multaj nevole, pro la fakto ke nia juna lernonto tute ne povis paroli sian gepatran lingvon pro terura balbutado. Tamen ! La kurso progresis, kaj post nur kvar kaj duona monatoj la plej bona parolanto inter la gekursanoj estas la junulo kiu tute ne povis peti demandojn pri la nova lingvo per sia propra lingvo, sed kiu nun parolas Esperanton senhezite kaj tute laŭ maniero de radio-anoncisto, kaj kiu promesas fariĝis elstaranto inter niaj plej bonaj oratoroj. Ĉu unika afero ?

REDAKCIA LETERKESTO.

Kiel Subtenantaj Abonantoj de Heroldo por la kuranta abonperiodo aliĝis ankoraŭ s-anoj P. M. Mabesoone en Amsterdam, kaj Fr. Moolenaar en Groningen (Nederlando). Koran dankon pro la subteno !

Pri Esperanto en la budĝeto de la Sveda Registaro por 1947, pri kio ni jam mallonge raportis, ni publikigos detalan artikolon en la venonta numero.

Arja paralogismo.

(Daŭrigo de sur paĝo 1.)

ma intelekto. Ĉiuj ĉi metodoj havis komunaĵon : ke ili degradigas la sciencon kaj filozofion al la nivelo de ĉarlatan-kuracado.

La moderna evoluo de la ras-teorio datiĝas de la Linne'a preciza difino de la rasoj. Laŭ ĝi, la homaro povas esti dividata je kvar rasoj — blanka, nigra, flava kaj ruĝa — laŭ la koloro de la haŭto. Kiel ni vidas, du jarcentoj de esplorado de la afero malsukcesis, konsiderinde modifi ĉi tiun simplan klasifikon.

Moderna rasismo en la pli malvasta senco havis du literaturajn pionirojn. Ili estis la franca diplomato Jozefo Arturo *Gobineau,* klaskonscia aristokrato, kiu malŝatis la francojn, kaj la renegata anglo Houston Stewart *Chamberlain,* kiu malŝategis la anglojn kaj esperis, ke la germanoj ilin ekstermos. Ĉi tiuj du aŭtoroj bazis siajn komunikaĵojn sur la filologiaj verkoj de la senkulpa lingvisto nomita *Anquetil-Duperron.* Ĉi tiu lingvisto faris la *Zend-Avesta,* la antikvan sanktan skribaĵon de la persoj, alirebla por la eŭropanoj kaj malkovris per komparo de Zend kun *Sanskrito* la komunajn radikojn de la eŭropaj lingvoj.

Tiel, arjanismo estas origine afero de filologio. Ne ekzistas arjoj konservitaj en vitrokestoj de muzeoj, kaj ili ne estas konataj al la antropologio aŭ etnografio ; la vorto « arjo » estas pure lingvoscienca termino.

Sed la eltrovo de Anquetil-Duperron havis konsekvencojn. Jam havante, post tiu ĉi eltrovo, la « arjan lingvon », oni bezonis ankoraŭ krei «arjan homon ». La voĉaj akordaĵoj, tiel paroli, estis disponeblaj, sed la restaĵo de la kreitaĵo mankis ! Febra serĉado por la arja tipo de homo komenciĝis. La rezulto estis komedio de eraroj, kiu havis malmultajn ekzemplojn en la scienca mondo. Laŭ la teorio de Gobineau arjoj estis ĉiam la elito inter la rasoj. Ĉiu civilizo, kiu iam ekzistadis, estis kreita de ili.

La originoj de la vorto « raso » estas nekonataj. Ĝi ne troviĝas en iu klasika lingvo, pro la tute simpla kaŭzo, ke la antikvuloj ne havis raskoncepton. Sed de post la malfrua dek-oka jarcento, kiam Buffon, Goethe kaj Kant popularigis ĝin, ĝi fariĝis unu el la plej vaste uzataj kaj malplej komprenataj vortoj, ĝia aplikebleco ampleksis la tutan vojon de la « homa raso » ĝis iu el ĝiaj etnikaj, naciaj aŭ religaj kaj kulturaj elementoj, tiaj kiaj la « negra raso », la « germana raso » kaj la « juda raso ».

Tiaj konfuzoj estas neeviteblaj, ĉar minimume de dek mil jaroj ne ekzistas pura raso de nia speco. Tra la historio ekaperis kaj evoluis la homaj grupoj per kontakto kaj mikso, kiel kelkaj el la prominentaj garantiantoj de rasismo — naive nekonsciaj pri ĝiaj kontraŭecoj — mem konstatis.

(Finota.)

VERDULAJ VORTOJ

D-ro L. L. Zamenhof :

Ĉiu nova ideo devis batali longe kaj malfacile ... Ni, veraj amikoj de lingvo tutmonda, scias tion ĉi tre bone, kaj ni laboras pacience, pacience, pacience, kaj nek la tuta terura surdeco, kiu regas ĉirkaŭ ni, nek la malkuraĝigaj malesperigaj batoj de la sorto, kiujn ni renkontas sur ĉiu paŝo, forpelos nin de nia vojo. Armitaj per tiu ĉi fera pacienco kaj per la konscio de la vereco de nia ideo, ni iras antaŭen malgraŭ la malhelpoj, kiuj baras ĉiun nian paŝon, kaj ni ne dubas, ke pli aŭ malpli frue ni venkos.

(« La Esperantisto », 1893.)

E. Lanti :

Ni memoru la saĝajn konsilojn de la aŭtoro de nia lingvo ; li ja ĉiam rekomendis, ke oni ne devas ĝin kateni per tro severaj reguloj. Sed estas por mi klare, ke la plej simplaj formoj venkos, ke la plej klara stilo sin trudos kaj fariĝos klasika. Kiu penas kiel eble plej senbalastigi sian stilon, tiu iras en la ĝusta direkto.

(5.12.1929.)

Robert Kreuz :

Nia ĉefa devo estas ... unue zorgi pri pligrandigo de la aktiva anaro. Ni komencu kursojn, instruadojn ĉiam kaj ĉie, kie tio estas ebla. Mi scias bone, ke mankas al ni instruistoj. Pro tio ni devas interesigi la instruistojn, kiuj helpos al ni efektivigi tion. Tiamaniere ni atingos, ke Esperanto estos disvastigata. Por laŭcele uzi ĝin, ni devas eduki la anaron en praktika senco.

(« Esp. Triumfonta », 13.3.1921.)

Tri virinoj en la vivo de Chopin

Lia vivo kaj liaj verkoj

La 22-an de februaro revenis por la 137-a fojo la tago de l' naskiĝo de la granda pola komponisto. Je lia honoro ni publikigas ĉi-sekve la tekston de prelego, kiun Varsovia samideano faris per la Pola Radio, okaze de la datreveno de l' mortotago de Chopin.

*

Se iam vi vizitos Parizon, ne forgesu, dum la vizitado de ĉiuj ĉefaj vidindaĵoj iom pli longe resti en la fama tombejo de Père Lachaise kiun, certe, montros al vi via gvidanto. En ĝi, en angulo de komponistoj, vi tuj vidos marmoran junulinon-muzon, kiu kun mallevita kapo kaj kun rompita liro en la mano priploras tiun, kiu estis enterigita sub tiu ĉi monumento antaŭ 97 jaroj, la 17-an de oktobro 1849 : poeton de sonoj, polan genion muzikan, *Frederikon Chopin.* La junulino fidele gardas sian trezoron, eĉ kun la risko de persona sendanĝereco : dum la postaj revoluciaj bataloj kanona grenado frakasis ŝian manplaton.

Sur tiu ĉi monumento, starigita en franca ĉefurbo, kun francaj surskriboj, estas unu detalo, kiu substrekas la naciecon de la genia muzikisto. Ĝi diras, ke Chopin naskiĝis en pola vilaĝo Zelazowa Wola, proksime de Varsovio, kaj ke lia patrino estis fraŭlino Krzyzanowska, « filino de pola nobelo ».

Tie, en Polujo, meze de kampoj de Mazurlando, naskiĝis *Szopen* en 1810, kaj la kantoj de la mazura vilaĝano inspiris al li la kreadon de multaj polaj melodioj kaj mazurkoj.

Laŭ lastaj esploroj, la avo de la patro de Frederiko estis polo, elmigrinta el Polujo, Nikolao Szopa, kiu en la 18 a jarcento venis Francujon kie, franciginte sian familian nomon, li edziĝis al francino. Sian nepon, patron de Frederiko, li sendis Varsovion serĉi feliĉan sorton. En Varsovio, dum insurekcio (ribelo) de Kosciuszko, la patro de Frederiko batalis kun rusa armeo, en la antaŭurbo Praga.

La juna Frederiko tre frue komencis studi la muzikon kaj, havante nur sep jarojn, jam komponis sian unuan polonezon. Varsovio tiutempa estis muzikema urbo — ĝi havis eĉ tridek ejojn, kie oni fabrikis fortepianojn !

Chopin havis 19 jarojn, kiam li finis la ĉefan muzikan lernejon, sub la gvidado de ĝia direktoro, Elsner, kiu estis la unua instruisto de Chopin kaj notis en lia ekzamenmatrikulo : « muzika geniulo » !

En oktobro 1830 Chopin decidis vojaĝi okcidenten por plua muzika studado : li donas en Varsovio sian « adiaŭan koncerton », kie kune kun li aperas la juna kantistino (kaj ni diru interkrampe : lia unua amo) fraŭlino *Konstancja Gladkowska,* pri kies voĉo unu el la kritikistoj diris ke « kantita de ŝi noto ‚h' mil dukatojn valoras » !

Forveturontan Frederikon surprize adiaŭas liaj kolegoj, kiuj neatendite kantas por li ĉe la urbolimo la adiaŭan kanton, kiu finiĝas per vortoj : « sed via koro restos inter ni ». Tiuj ĉi vortoj estis profetaj, ĉar eĉ post la morto de Chopin lia koro estis transportita Varsovion, kie ĝi estis enmurigita en la preĝejo de Sankta Kruco. Antaŭ la insurekcio de 1944 ĝi estis eltransportita sekrete kaj revenis post la fino de la milito.

Dum sia vojaĝo tra meza Eŭropo, en septembro 1831, Chopin eksciis, ke la unua pola insurekcio estis subpremita post sanga ŝtormo de sieĝita Varsovio. Chopin skribas en sia taglibro : « La urbo bruligita, ruinigita ... miaj amikoj certe sur la muroj pereis ... O, Dio ! Ĉu Vi estas kaj ne venĝas ? » Tiuj ĉi sentoj inspiras al Chopin komponadon de lia fama etudo C-mola, tiel nomita « revolucia », pri kiu unu el la kritikistoj skribis, ke ĝi montras ian potencan Jupiteron kiu, sidante sur la montpinto de Olimpo, ĵetas la fulmojn sur la tremantan mondon ».

Post longa vojaĝo tra meza Eŭropo Chopin fine trafas Parizon, kie li trovas ĝustan aeron por sia genio, des pli ke li renkontas en tiu ĉi urbego talentan virinon, al kiu li dediĉis naŭ jarojn de sia vivo. Sed ni diru sincere, ke en la vivo de Chopin estis ankaŭ alia persono, kies postsignojn ni vidas nun en la leteroj, skribitaj de virina plumo, kiuj estas kune laĉitaj, kaj sur la koverto estas skribita per mano de Chopin : « Mia mizero ». Tiu ĉi persono estis fraŭlino *Maria Wodzinska,* filino de riĉa pola bienposedanto. Kun ŝiaj fratoj Chopin estis en la Varsovia lernejo. F-inon Wodzinska li renkontas denove en Dresdeno en 1835, kaj dum la daŭro de du jaroj treniĝas la pala letera romano, kiu finiĝas en 1837 laŭ deziro de ŝiaj gepatroj, kiuj ne estas kontentaj pri la amindumado de «iu» muzikisto. Baldaŭ ŝi edziniĝis al la grafo Skarbek, kaj tiam Chopin, plendsente, enmetas ŝiajn leterojn en la koverton kaj skribas sur ĝi : « Mia mizero ». Tiun ĉi koverton kun la leteroj vi povas nun vidi inter ekspozitaĵoj de la Popola Muzeo en Varsovio.

Sed post sia disreviĝo Chopin sufiĉe rapide renkontas en Parizo alian virinon — vidvinon de barono Dudevant, kiu estas fame konata sub la kaŝnomo de *George Sand.* Ŝia naŭjara kunvivado kun Chopin ne estis tro feliĉa : pli maljuna, vestanta sin laŭ vira modo, kun cigaredo en la buŝo (memoru : antaŭ cent jaroj !), Sand estis konata sub la moknomo « emancipulino ».

Ĝis nun la biografoj ne povas decidi, kiu estis kulpa en tiu ĉi malbone kunligita paro. Antaŭe ili preskaŭ ĉiuj kulpigis « Lady Tartuffe », kiel Sand estis nomita de unu el la biografoj, sed lastatempe sonas novaj, pli agrablaj por Sand, voĉoj.

Ĉiuokaze ŝi venĝis, verkante romanon sub titolo « Lucrezia Floriani », en kiu ŝi prezentis la historion de ilia amo, kaj sub la nomo de princo Roswald ŝi pentris Chopin kiel « neelteneblan, ĵaluzan, distingitan neŭrasteniulon ». Ŝi pentris sin mem kiel mildan artistinon, kiun kondukis al la morto la neeltolerebla amanto.

Heinrich Heine, traleginte la romanon, skribis : « Tiu friponino indignamaniere turmentis mian amikon Chopin en sia aĉa sed die verkita romano. »

Sand dementis kaj juris, ke ŝi ne skribis la romanon de sia amo ; sed laŭ opinio de la biografoj ĉiu, kiu deziras enpenetri en la plej sekretajn misterojn de la animo de Chopin, devas skrupule studi la romanon « Lucrezia Floriani ».

Ni aldonu ke, kiam tri jarojn post ilia disiĝo Chopin mortis, Sand ne venis por adiaŭi tiun, kun kiu ŝin ligis tiom da memorajoj. Estas konate, ke la plej belajn improvizaĵojn Chopin komponis dum tiuj naŭ jaroj, kaj inter ili la ĉefan majstroverkon : faman polonezon As duran, kiu estas la plej brila apoteozo de la pola estinteco. Chopin rakontis, ke dum la komponado en la soleca turo de la kastelo de George Sand, en ŝia bieno en Nohant, li imagis, kvazaŭ li aŭdas la pasadon kaj la sonon de l' sabroj de la praavoj, kvazaŭ li vidas iliajn figurojn, kiuj paŝas al li en majesta procesio. Chopin ne povis elteni la impreson, kaj meze de la komponado li forkuris el la turo.

Tiu ĉi polonezo ofte estas komparata kun la priskribo de polonezo en la konata epopeo « Sinjoro Tadeo » de Adam Mickiewicz.

Estas ankaŭ aliaj komponaĵoj, en kiuj Chopin klare substrekis la polecon de sia muziko : ni parolas pri famaj mazurkoj, tiuj mallongaj ĉefverkoj de melankoliaj sentoj, parte plenĝojaj kaj bruaj, parte malgajaj, kiuj ĉiam estas penetritaj de poezio kaj reprezentas la sopiron de la poeto al la malproksima patrolando.

Laŭ opinio de muzikaj kritikistoj, Chopin estis unu el la plej grandaj revoluciistoj de muziko ; li detruis la formalan tradiciismon, malfermis por muziko la vojon al la libereco. Lia rolo estas decida en la historio de la muziko kaj havas grandegan signifon por nun kreata « nova » muziko.

Lia muziko devojiĝas de la banala ŝablono, enkondukas tiom da novaj kaj aŭdacaj elementoj, ke ilia revoluciemeco fariĝis la fundamento de la progreso en la evoluo de la muziko.

S.A. KOWICZ, Varsovio.

La starto de Heroldo en 1947.

Je la fino de la jaro 1946 Heroldo atingis ĉ. 1530 abonantojn en 48 landoj. Bedaŭrinde dudeko el tiuj abonintoj « forgesis » pagi sian abonkotizon por 1946.

Ĝis 31.12.1946 reabonis aŭ novabonis por 1947 proksimume 260 abonantoj en 22 landoj. Ĝis 10.2.1947 reabonis aŭ novabonis por 1947 proksimume 1100 abonantoj en 43 landoj. Relative plej multajn novabonojn ni akiris en Ĉeĥoslovakio ; signo por la vigla intereso nuntempe tie reganta por nia afero : en 1946 ni havis tie 41, sed ĝis 10.2 1947 jam 90 abonantojn.

Eble interesos niajn legantojn la ciferoj pri kelkaj aliaj landoj. Ni donas la ciferojn el 1946 kaj (inter parentezoj) tiujn je 10. 2.1947 :

Aŭstrio 41 (59) ; Britujo, inkl. de Skotlando, 252 (148); Belgujo 70 (47); Danlando 98 (70); Finnlando 20 (31); Francujo 145 (84); Italujo 95 (78); Jugoslavio 33 (21); Nederlando 251 (171); Norvegujo 39 (19); Svedujo 88 (70); Svislando 28 (39) ; Usono 102 (32).

El la supraj ciferoj oni vidas ke, krom Ĉeĥoslovakio, ankaŭ Aŭstrio, Finnlando kaj Svislando jam plibonigis la rezultaton de 1946. En la ceteraj landoj ni esperas minimume atingi la ciferojn de la pasinta jaro. Sciu ke ni bezonas 2000 abonantojn por regule eldonadi Heroldon duonmonate, ĉe la nunaj kostoj kaj abonkotizoj.

La starto de Heroldo en 1947 estas kontentiga ; ni esperas ke la samon ni povos diri ankaŭ pri la finrezultato de la nuna abonperiodo.

RIDO SANIGAS

LA RIMEDO.

— Kaj via hundo, ĉu ĝi ankoraŭ ĉiam sin kaŝas sub la brakseĝoj ?

— Ho ne, mi tute dekutimigis ĝin de tio.

— Kiel do, ĉu per vipo ?

— Tute ne ! Mi nur detranĉis la piedojn de la brakseĝoj.

INFANOJ

Panjo : Petro, kial via frateto tiel ploras ? Mi ja ordonis al vi amuzi lin ...

Petro : Mi ne scias kial ; mi nur montris al li kiamaniere mangi sian kukon.

SPERTO.

— Paĉjo, kio estas sperto ?

— Sperto, mia bubo, estas tio, kio restas al iu, post perdo de ĉio.

LA KURACISTO.

— Estas absolute necese ke vi faru pli multe da korpa ekzercado. Ekzemple, vi eble povus de nun mem streĉi vian horloĝon ? !

Parolas la leganto (Libera Tribuno).

UNO-BABELO.

Preskaŭ ĉiutage ni legas artikolojn en ĵurnaloj kaj gazetoj pri ĉi tiu temo. Kaj de tempo al tempo niaj fervoraj propagandantoj alpafas leterojn al la redakcioj koncernaj, pretendantajn ke la tuta afero solviĝus kvazaŭ per svingo de febastono, se UNO nur alprenus Esperanton.

Tion mi ne neas. Sed ŝajnas al mi ke, se ni ĝisfunde pripensos la demandon, ni konstatos, ke ni farus pli da bono al nia afero, se ni iom pli modeste atentigus pri la valoro de Esperanto en internaciaj konferencoj.

Ni bone scias, ke la delegitoj ĉiam insistas — kaj ne senprave — uzi la proprajn lingvojn kiam ili faras paroladojn. Ili tiel agas, ĉar ili konscias, ke pere de la propra lingvo ili kapablas pli emfaze kaj profite esprimi siajn argumentojn, aŭ refuti la argumentojn de antaŭaj parolintoj.

Ni ne ignoru ankaŭ, ke la lernokapablo de homoj tre varias, eĉ kiam temas pri tia simplega lingvo, kia Esperanto. Eĉ post plena studado estas dube, ĉu ĉiuj delegitoj kapablus tiel elokvente oratori en Esperanto, kiel en la propra nacia lingvo.

Sed la sperto multjara jam klare pruvis, ke ĉiu kapablas perfekte *kompreni* Esperanton, post nelonga studado.

Mi tial sugestas, ke la plej racia propono estas : Ke ĉiuj delegitoj daŭre uzu siajn proprajn lingvojn kiam ili alparolas la konferencon. Kaj ke la *sola traduklingvo* estu *Esperanto.* La Esperantajn tradukojn oni disaŭdigu pere de laŭtparolilo, kaj tiel ĉiuj aŭskultantoj samtempe komprenos la tuton. Tiu metodo evitigus la nunan tro komplikan sistemon kiu postulas la uzon de kapmikrofonoj kaj de multnombraj diverslingvaj tradukoj. Ĝi ŝparus la tempon (por ne paroli ankaŭ pri la pacienco) de la ĉeestantoj, kaj tamen neniel ofendus nek agacus la parolintojn.

Se aŭ kiam Esperanto tutmondiĝos, ni rajtos esperi, ke en ĉiuj internaciaj konferencoj la internacia lingvo estos uzata tiel, kiel oni jam ĝin uzas en Esperantaj kongresoj. Sed tiu feliĉa stadio ankoraŭ ne alvenis. Intertempe, ni ne bruu tro idealisme, sed penu praktike kaj logike konsili kaj konsentigi.

N. H. C. MACPHERSON.

LA SOCIO ESTONTA.

Konstrui belaspektan aŭtomobilan muntkadron kaj korpaĵon *sen motoro,* kaj tiam grati la verton pro miro ke la aŭtomobilo ne kuras, oni tuj taksus kiel malsaĝan, mallogikan agadmanieron. Tamen jen kion faris R. Ekmark en sia artikolo en Heroldo n-ro 1/1060, ĉar li volas ignori la ekonomian bazon de la vivado sur la terglobo nia. « La homo vivadas ne nur per pano ... », estas dirite, sed ni ne forgesu ke sen « pano » li tute ne povas ekvivi.

Junulo Ekmark supozas, ke la homo estas nature malbona. Mi senrezerve neas tion kaj asertas firme, kiel kredareron kaj kiel taksaĵon je la homoj (post 46 jaroj de mia vivo) ke la homo laŭnature estas *bona.* Filo Ekmark priskribis la malbonan konduton de sia patro. Li kulpigas la drinkemon ; sed mi volus demandi, kio kaŭzis la drinkemon ? Ĉu lia patro estis sendependa riĉulo, aŭ ĉu li estis laborsklavo ? Kiaj estis la ekonomiaj kondiĉoj ĉe lia hejmo?

La Atlantika Ĉarto estis ideala pia sensencaĵo pro tio, ke mankis en ĝi la efektiviga maŝinaĵo. La bonintenca artikolo de s-ano Ekmark similas tiun ĉarton pro la sama kialo. « Pri la ekonomiaj kaj teknikaj aferoj mi ne parolos ... » Ĉu tio nur atestas lian junecon malpaciencan ?

SOCIKREDITANO J.W.L.

PLIBONIGU LA MONDON, KOMENCU JE VI MEM !

Preskaŭ ĉiufoje, legante Heroldon, mi ekdeziras reagi je iu artikolo. Pro manko de tempo miaj pensoj restis en mia plumo. Sed nun, bedaŭrinde pro malsano, mi jes havas tempon.

Mi opinias ke vi pravas koncerne al la formato de Heroldo. Ĝi kiel eble plej multe aspektu kiel ĵurnalo kaj, pli « rojalisto » ol reĝo, mi konsilas : ne publikigu propagandajn artikolojn (kiom ajn interesaj ili ofte estas) sur la unua paĝo. Rezervu ĝin por informoj kaj instruaj artikoloj pri postmilitaj problemoj ktp.

Pri la artikolo de s-ro Robertson : Ni ĵus venkis « salutgeston », pli ĝuste « salutgestaĉon », kaj nun enkonduki ion similan mi ne ŝatas ; povas esti ke ni nederlandanoj estas tro realistaj ?

Mi estas forte kaj profunde konvinkita ke la kaŭzoj de mondmilitoj estas ekonomiaj ; en 1939 neniu popolo deziris militon, estis kvazaŭ polipo etendis siajn brakojn trans la mondon. Kaj tiuj liaj brakaĉoj ankoraŭ regas, eĉ en nekapitalistaj landoj! Samideano-socikreditano J.W.L., mi pensas, pensegas ! Rilate al lia artikolo : Kiajn rajtojn havis atomlupoj juĝi pri nazilupoj? Rajton de venkinto !

Ni, Arnhemanoj, estas spertaj pri la homa moralo. Germanoj ŝtelis unue, poste aliancanoj kaj nederlandanoj ŝtelis, kiam eble, Arnhemanoj « interŝtelis », eĉ policistoj ŝtelis ! Tiel mi venas al la artikolo de s-ro Ekmark, junul entuziasma artikolo, kiun mi tre interesite legis. Feliĉulo, estu tiel entuziasma malgraŭ tiaj travivaĵoj dum infaneco, — aŭ ĝuste tial ?

Rilate al lia artikolo mi pensis, ĉu ne estus pli bone por la homoj malhavi cerbon, samkiel birdoj kaj fiŝoj. Ni ne scipovas uzi ĝin. Cetere filozofo asertis ke alvenis cerbo al la homo pro manko de korpoforto kaj intuicio ! Sed, ĉar ni ja havas cerbon, estas nepre necese, ke ni pripensu la ekonomiajn aferojn. Interalie : frua edzeco ankaŭ havas ekonomian aspekton.

S-ro Ekmark malŝatas malamon kiel plej grandan malamikon : por mi «egalvaloras» *mem*amo. Mi estas bakisto, kaj malverŝajne granda estas la multo da homoj kiuj sentas sin tro « altrangaj, gravaj, monhavaj, cerbhavaj » kaj eĉ tro « edukitaj » por saluti bakiston ! Ĉu vi konas la modan frazon : « Plibonigu la mondon, komencu je vi mem ! » ?

Tiel longe kiel ekzistas sekretaj agentoj, tiel longe kiel la mono (kiom da ĝi !), destinita por tiaj « sekretservoj », estas rentumdona, tiel longe la militbarometro staras je ventego.

B. COSIJNSE, Arnhem.

Ni recenzas.

Miroslav Krleja : Adriatika temo. Kun permeso de la aŭtoro tradukis el la kroata lingvo Marko Demetrovič. Kun 2 ilustraĵoj. 22 p. kaj kovrilo, 14,5 x 22 cm. Eldonis Bulgara Esperantista Kooperativo, Gr. Ignatiev 2, Sofia, Bulgario. Ankaŭ havebla de Kroatia Esperanto-Ligo, ul. Neznane Junakinje 1-III, Jugoslavio. Prezo ne indikita.

Oni povas kompreni ke la popoloj ĉe l' orienta bordo de Adriatika Maro — dum jarmiloj batalinte por sia sendependeco, dum jarmiloj almilitite aŭ superregite de romanoj, venecianoj, turkoj, aŭstro-hungaroj, kaj laste de italoj kaj germanoj — fine volas esti mastroj en propra lando, kaj mem decidi pri sia sorto. Same, ke ili protestas kontraŭ humiligoj kaj insultoj, kvazaŭ ili estus barbaroj, nacio de banditoj kaj korsaroj, sen propra kulturo, sen grandaj homoj, sen veraj herooj, sen sanktuloj, artistoj ktp. Ankaŭ ke, estante slavoj, ili direktas parton de siaj esperoj al la granda slava frato en oriento. Eĉ tion oni povas kompreni ke, humiligite kaj suferinte tra jarcentoj kaj jarmiloj, kaj efike defendinte en la lasta mondmilito sian ankoraŭ junan sendependecon, ili nun etendas siajn rigardojn kaj dezirojn al teritorioj kaj urboj, kiujn oni jam ne sendispute cedos al ili.

Kiu iomete konas Jugoslavion, scias ke ĝi estas lando de granda beleco, dolĉe ĉarma en siaj apudmaraj partoj kaj sur la insularoj, majeste impona en siaj montaroj, kaj ke ĝi sendube posedas sian kulturon, konstateblan en diversaj ĝiaj partoj, en ĝiaj urboj, vilaĝoj kaj izolaj bienoj. Kaj ĝiaj popoloj — serboj, kroatoj, slovenoj kaj montenegranoj — brave defendis la liberecon kontraŭ la teror-invado de l' faŝismo kaj nacisocialismo, kaj ankaŭ ĝia esperantistaro ne restis poste : preskaŭ duono de l' jugoslava samideanaro falis en rezista batalo aŭ pereis alimaniere.

Jugoslavio kaj ĝiaj popoloj meritas nian atenton, Jugoslavio meritas la intereson kaj simpation de la mondo. Ne lando de barbaroj, korsaroj kaj bovoŝtelistoj, kiel volis kredigi al ni interesita propagando, sed de popoloj kiuj deziras sincere kunlaboradi sur progresema bazo en la granda rondo de ĉiuj nacioj bonvolemaj.

M.

Literatura Mondo reaperis.

Literatura Mondo reaperis ! Denove unu ero, ĝis nun ankoraŭ mankinta, eniĝis en la ĉenon de l' esperantista gazetaro. Kaj ĝi ja estas unu el ĝiaj eroj plej gravaj. La unua numero 1-2 (duobla) ampleksas 32 paĝojn kaj kovrilon en formato 29 x 20 cm.; ĝi estas plaĉe aranĝita kaj faras tre bonan impreson.

Per ĉi tiu numero L.M. komencas sian trian periodon. Ĉefredaktoro estas K. Kalocsay, ĉefkunlaboranto J. Baghy, kaj la redaktan komitaton formas s-anoj F. Szilagyi, L. Tarkony (Totsche) kaj G. Waringhien. Adreso : Rökk Szilard-str. 28, Budapest VIII, Hungarujo. Jarabono kostas 2,50 dolarojn. Niaj abonantoj povas aboni ĝin por gld. 6.— ĉe nia Libroservo.

En la unua numero oni trovas artikolojn de Kalocsay, Baghy, J. Dan, O. Henri, A.E. Gellĕri, Lu Sin, A. Baur kaj aliaj, kaj poemojn de Tarkony, Kalocsay, T. Jung, R. Laval, E. Michalski, R. Burns (trad. Roseti).

« Neniu lingvo povas vivi sen literaturo », skribas la eldonejo sur akompana cirkulero. Kaj sendube estas ke la rondo de niaj samideanoj ĉirkaŭ L.M. plej multe faris por la evoluigo de respektinda Esperanto-literaturo. Tial ili meritas la subtenon de ĉiu esperantisto.

ENIGMO-KONKURSO N-ro 10.

Hodiaŭ ni publikigas iom ampleksan enigmon, senditan al ni de s-ano *P. H. Mooij*. Sed por ĝia solvo ni donos pli longan tempon ol kutime : solvoj (sur aparta papero aŭ poŝtkarto) atingu nin ĝis la *15-a de aprilo,* sub la adreso : Heroldo de Esperanto, Scheveningen, Nederlando.

Por la ĝusta solvo de tiu ĉi enigmo ni fiksis la jenajn premiojn :

1. E. de Amicis : Koro.
2. Collodi : Pinokjo.
3. Justesen : Verema raporto pri la German-Molsa Milito.
4. kaj 5. Bulthuis : Malriĉa en spirito.

LITERGRUPA ENIGMO.

ado — afi — ala — ali — alo — alo — alo — ame — amo — apo — ari — aro — aro
ati — bat — bof — cim — cio — dek — dol — ekl — eks — ekt — ekv — elo — eni
eno — ent — eri — eri — ero — gar — gio — ide — idi — iko — imi — imp — inĝ
ino — ino — inv — ipt — iŝo — iva — kar — kco — kil — kio — kon — kon — kso
kur — lam — lit — log — man — mat — nav — nek — nek — nos — nto — obj — obs
ofo — ogo — ogr — ogr — okc — oli — ono — opt — oti — oto — pat — per — plu
ram — rep — ria — rko — rof — rol — rom — rop — sio — smo — smo — spe — sto
str — tal — tik — tmo — tra — tro — tru — ult — uta — ver — zeb.

El la supraj 102 litergrupoj formu 34 naŭliterajn vortojn. La komencliteroj de tiuj vortoj formas proverbon. La signifoj de la vortoj estas :

1. reprodukti sur papero per presado desegnaĵon; 2. surtegmenta fako de veturilo, aranĝita por sidigi veturantojn; 3. penado por superi alian ; 4. tendenco trovi, ke ĉio estas bona en la mondo ; 5. krudaĵoj, el kiuj oni povas produkti fabrikaĵojn ; 6. blanka materio kun ĉielarkaj rebriloj, teganta la internon de kelkaj specoj de marŝonkoj ; 7. delikatgusta plata marfiŝo samfamilia kiel pleŭronekto ; 8. troprofiti el ies laboro, ne donante justan rekompencon; 9. sopiro al la patrolando; 10. superlinia komoforma signo ; 11. malgranda kvanto de ia komercaĵo, servanta por konigi ĝin al eventualaj aĉetontoj ; 12. respektinda maljuna familiestro ; 13. opinio de la publiko pri iu ; 14. terorbito ; 15. longo de varo ; 16. nelogika aparta vortokonstruo, propra al iu lingvo, sed ne al aliaj; 17. festaj tagoj antaŭ la granda fasto ; 18. sistemo de regado, en kiu la aŭtoritato apartenas nur al malmultaj homoj aŭ familioj; 19. mallonga biografia raporto pri jus mortinta persono ; 20. malsameco de du objektoj aŭ ideoj ; 21. detala etato, en kiu estas sinsekve enskribitaj objektoj apartenantaj al iu ; 22. la tempo de la jaro, kiam okazas egaleco de la nokto kun la tago ; 23. nombro de aritmetika progesio, respondanta al alia nombro de geometria progesio; 24. parto de infanteria regimento ; 25. parto de la horizonto, kie la suno ŝajnas subiri ; 26. perpendikulara al la ebeno de la horizonto; 27. intenca malhelpado al parlamenta laboro, farita per ĉiuj leĝaj rimedoj ; 28. korda muzikilo kun longa tenilo kaj duonsfera sonorkesto ; 29. lazurblua farbo ; 30. malhelbrune striita haŭto de afrika ĉevalo ; 31. homo, kiu per helpo de sciencaj metodoj kondukas kaj direktas teknikajn laborojn ; 32. pezunuo ; 33. bazita sur senpartia esploro, sendependa de individuaj plaĉoj ; 34. esplora dissekco de kadavro.

*

SOLVOJ
de la Enigmo-Konkurso N-ro 8.

LABIRINT ENIGMO.

Horizontale : a 1. Nurnbergo ; b 2. Leo ; b 6. tre ; c 1. us ; c 4. tra ; c 8. do; d 2. pom; d 6. akt; e 1. juĝistaro (eventuale : juristaro); f 2. rol; f 6. ale; g 1. ke; g 4. ran; g 8. ho; h 2. odo; h 6. UNO; i 1. tribunalo.

Vertikale : 1 b. subjekt; 2 a. ul; 2 d. pur; 2 h. or; 3 b. emo; 3 f. ond; 4 a. not; 4 d. mil; 4 g. rob; 5 a. Bari; 5 f. paru; 6 a. eta; 6 d. ata; 6 g. nun; 7 b. rok; 7 f. lun; 8 h. ge; 8 d. tre; 8 h. ol; 9 b. monopol.

KAŜ ENIGMO.

Serb; pers; ital; rus; aŭstr; dan. — Spirad'.

Tiun ĉi fojon alvenis 49 solvoj el 12 landoj, el kiuj 41 solvoj el 12 landoj estis korektaj; 7 ensendintoj korekte solvis unu enigmon. Kiel solvintojn de la dua enigmo ni akceptis ĉiujn kiuj trovis la finsolvon (spirad'), kvankam ĉe kelkaj la gentnomoj ne koincidas kun la niaj. Ni estis forgesintaj aldoni ke la literoj de la gentnomoj devas esti sinsekvaj ; tiel kelkaj solvintoj trovis plej neverŝajnajn nomojn, ekz. indian', abisen', eĉ ĉipr' (?). Jen la premiitoj:

1. Inĝ. L. Krajič, Tabor, Ĉsl.
2. Nils Utne, Trondheim, Norvejugo.
3. Sven Sjöblom, Malmö, Svedujo.

Esperanta Radio-Kalendaro.

Ankoraŭ validas la Radio-kalendaro publikigita en n-ro 3 de 1.2.1947. Sed oni aldonu por merkredo :

10.15-10.35 Paris 431,5 m. Esperanto-kurso.

Krome la lundaj kaj ĵaŭdaj elsendoj el Praha okazas nun unu horon pli frue, nome je 21.50 GMT ; la ĉiutagaj elsendoj je 18.00 ne plu okazas, anstataŭas ilin ĉiutaga elsendo per ondo 49,92 m je 19.30 GMT, krom la elsendo je 22.00.

Notu ke la 5.4. okazos Esp.-elsendo el Hilversum VARA, 301 m, je 15.10-15.25 GMT.

ATENTU !

Geesperantistoj tutmondaj !

Unu el la plej grandaj libro-eldonejoj danaj eldonos novan danan konversacian leksikonon kaj petas *vian helpon.*

Mankas al ni bonaj ilustraĵoj, tial ni petas vin, bonvolu pruntedoni al ni *fotografaĵojn* (klarajn poŝtkartojn) kaj *desegnaĵojn,* kiuj prezentas famkonatajn personojn, konstruaĵojn, pejzaĝojn kaj bildojn de homoj kaj bestoj, tipaj de via lando, ktp.

Ankaŭ mankas al ni bonaj landkartoj.

Al ĉiuj, kiuj sendos al ni dek apliikeblajn aĵojn, ni rekompencos per Esperanto libro.

Bonvolu sendi materialon al kunlaboranto de la leksikono.

Adreso : S-ro J. Vesterland-Andersen, Bernstorffvej 78, *Hellerup,* Danlando.

MENDEBLA

antaŭpage ĉe *f-ino A.H.C. Thewes,* Kortemeesstraat 26, *Bergen-op-Zoom* (afrankite) por nederlandanoj :

Vivo de Zola	f 1.50
La araneoj	f 0.35
La vivo de la eskimoj	f 0.35
Batalo pri la domo Heikkilä	f 0.50
La fianĉiĝo de Lea	f 0.50
La botistoj	f 0.75
Jarabono « Monda Revuo ilustrita »	f 4.—

Nur poŝtĝirkonte sub nomo de *f-ino A. Jansen, Bergen-op-Zoom,* n-ro 3993.52.

(27)

ANONCETOJ

Anoncetoj kostas por ĉiuj 20 komencitaj vortoj aŭ mallongigoj kvinonon de la jarabono, aŭ 20 b. fk., aŭ 1.— gld., aŭ 5 resp.-kuponojn ; por trifoja enpreso duobla prezo. — Ni senpage publikigas anoncetojn pri serĉataj personoj kaj pri familiaj aferoj esperantistaj : naskiĝo, fianĉiĝo, edziĝo kaj gravaj jubileoj.

Naskiĝo Dercks-Jansen. La 10.2. naskiĝis al ges-anoj Dercks Jansen en Bergen-op-Zoom (Nederlando) filino, nomita Sixta Christina Adolphine Maria. — Ni kore gratulas.

Amiko mia serĉas siajn patrinon kaj fratinon. Kiu povas informi min, ĉu ili vivas ? La patrino : Wanda Hanĉ Kessler, vidvino, naskiĝis antaŭ 56 jaroj en Lodz, Polujo ; laste konata adreso : Wuguruy 3. La fratino : Maria Gertrud Hanĉ, nask. 4.6.1914, edziniĝis en Berlino al s-ro Kös. Mia adreso : Olga Margarita Pérez, Paraguay 1508, P.5, Ap.10, *Montevideo,* Urugvajo.

Litovo deziras korespondi precipe kun svedoj, norvegoj, nederlandanoj, usonanoj, aŭstralianoj kaj sudamerikanoj. J. Šimaitis, *(13 a) Scheinfeld,* UNRRA-Area 1042, USA-Zono, Germanujo.

Senhejmlandaj estonaj infanoj petas amikecon perletere kun esperantistaj infanoj en la tuta mondo : Arda Kauer, 12jara knabino, Marju Hiiesalu, 13jara knabino, Jese Kindman, 15jara knabino, kaj Viktor Moorats, 12jara knabo. Adreso : D.P. Camp. Schloss Löwenstein, *Kleinheubach a.M., bei Miltenberg,* USA-Zono, Bayern, Germanujo.

Deziras korespondi tutmonde, interŝanĝi pensojn, bildojn, muzikon, psikologion, poŝtmarkojn. Respondo garantiata. Afranku filatele, mi reciprokos. Fotografo Botha Jörgensen, *Ringköbing,* Danlando.

Mi deziras korespondi kun ĉiuj landoj. S-ro W.F. Visser, W. Beukelzstr. 11, *Den Helder,* Nederlando.

Mi deziras korespondon kun svisa samideano pri la gimnastikmovado en lia lando. J. Kuijpers, Dunantstraat 23 b, *Rotterdam W.,* Nederlando.

« *Popola Fronto* » *kaj* « *Informa Bulteno* » de Valencio kaj Barcelono (1936-39) estas serĉataj (ĉiuj numeroj) de eksbatalanto de Internaciaj Brigadoj. Bone rekompencotaj. Franz Haiderer, Strindberggasse 2, 6-4, *Wien 11,* Aŭstrio.

Dentteknikistoj ! S-ro Teo Jansen, van Kinsbergenstraat 6, *Den Haag,* Nederlando, deziras korespondi kun dentteknikistoj en la tuta mondo.

Mi deziras interŝanĝi ilustr. poŝtkartojn kun gesamideanoj en la tuta mondo. S-ro Arvid Johanson, Enebygatan 13, *Norrköping,* Svedio.

50-jaraĝaj geedzoj serĉas korespondantojn en aliaj landoj kaj kontinentoj pri seriozaj temoj (enlandaj kaj porvivaj cirkonstancoj, nacia ekonomio ktp.). S-ro Max Taetz kaj s-ino Frieda Taetz, Prinzenstr. 35, *(24 a) Eckernförde,* Schleswig Holstein, Brita Zono, Germanio.

30-jarulino deziras korespondi kun samideaninoj en Svedujo kaj Nederlando. Skribu al : F-ino Kathleen Tyler, Newmarket, *Nailsworth,* Glos., Britujo.

Deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kun ĉiuj landoj. Nepra respondo. Pierre Canus, 17 rue Dom. Ceillier, *Bar-le-Duc (Meuse),* Francujo.

La muzikisto Lars Bruzewitz, Central-exp., Vasagatan 9, *Stockholm,* Svedujo, deziras interŝanĝi poŝtkartojn kun la tuta mondo

Finnlandanoj, luksemburganoj, japanoj, etiopianoj kaj egiptoj! Mi deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kun vi. Mendes Costa, *Teixeira Sousa,* Angola, Portugala Okcidenta Afriko.

Komercistoj, industriistoj, ĉefkomerc oficistoj, komercfirmoj, kiuj deziras sciigojn pri grava *Specimenfoiro de Milano,* petu informojn ! Ĉe Rossi Guido, « M.U.I.M. » Strato A. Doria 32, *Milano,* Italujo.

Poŝtmarkojn, muzikajojn, Esp.-glumarkojn interŝanĝas Harry Khel, Pivonkova 2124, Praha XIII/75, Ĉeĥoslovakio.

Willy Balduf, pentrista majstro, Lerchenstr. 23, *(14a) Kornwestheim,* USA-Zono, Germanio, deziras korespondi pri ĉiuj temoj.

La Internacia Katolika Informejo senpage donas informojn pri la katolika religio al ne-katolikoj. Fr. M. Monulfus, sekretario, *Loonopzand,* Nederlando. (20)

Gimnaziano 14-jara deziras korespondi pri ĉiuj temoj kun gejunuloj tutmondaj. Certe respondos. Jac. Blokker, Bronsteeweg 26, *Heemstede,* Nederlando. (22)

Gekantistoj, kiuj deziras partopreni Esperanto-kantojn en Kalifornio je novjar tago, bonvolu skribi al P.O. Box 1909, *Long Beach,* Calif., Usono. (23)

La Preĝo de Nia Sinjoro. Signifoklarigo de Henry Thomas Hamblin. « Rekomendata al ĉiuj kristanoj » (Heroldo). Po du internaciaj respondkuponoj. Hipsley, Seventeen, Abbots Road, *Birmingham fourteen,* Britujo. (24)

Perlojn el prelegoj kaj leteroj de nia majstro entenas « *Pensoj de Zamenhof* », elekto de homaranaj pensoj. Tradukita al 4 lingvoj. Bela preso, bona aspekto. Prezo 4 int. respond-kuponoj. Mendebla ĉe la eldonanto, Svisa Esperanto-Societo, *Romanshorn,* kaj ĉe vialanda libroservo. (25)

Tutmondan korespondadon per ilustritaj kartoj aŭ leteroj pri ĉiuj temoj, kaj interŝanĝi ĉion kio estas interŝanĝebla, deziras s-ro Dirk M. Brink, Amazonenstraat 23 hs., *Amsterdam-Z.,* Nederlando. (25)

Esperantistoj, subtenu vian Muzeon ! IEMW, t.e. la Internacia Esperanto Muzeo en Wien, estas denove malfermota. Samideanoj, sendu materialon : librojn, gazetojn, presajojn, dokumentojn ktp. Ĉio estos kvitancata. Sendu provizore al kortega konsilanto Hugo Steiner, Bisamberg, *Wien 21,* Aŭstrio. (26)

Tabelo de Heroldo-kotizoj 1947.

La abonkotizoj por Heroldo estas egalaj al la MA-kotizoj de IEL. La abonperiodo daŭras de januaro ĝis fino de septembro 1947. Ni akceptas abonojn nur por la tuta periodo 9-monata.
Respond-kuponojn ni akceptas po gld. 0.20.

Lando	Abonanto	Subtenanta Abonanto	Heroldo-Patrono	Anonceto (po 20 vortoj)	Valuto	Oni pagu la kotizon al
Argentino	8	20	80	1.50	pesoj	E. Iglesias Nunez, Dehesa 1860, Buenos Aires
Aŭstralio	10	20	100	2/—	angl. ŝil.	L.E. Pfahl, 64 Brighton Street, Croydon, N.S.W.
Aŭstrio	20	40	200	4.—	aŭ. ŝil.	« Tramondo », Neutorgasse 9, Wien I
Belgujo	100	200	1000	20.—	belg. fk.	Flandra Esperanto-Instituto, P. v. Humbeekstr. 3, Brussel W. aŭ : Belga Esp.-Instituto, Antwerpen
Brazilo	40	100	400	8.—	kruz.	Brazila Ligo Esp., Praça de Republica 54, Rio de Janeiro
Britujo	10	20	100	2/—	ŝilingoj	Brita Esperantista Asocio, London W. 11
Ĉeĥoslovakio	100	200	1000	20.—	ĉs. kronoj	Esp.-Asocio en Ĉsl. Respubliko, Praha 47
Danujo	10	25	100	2.—	dan. kr.	L. Jakobsen, C. Etlarsvej 14, Aabyhój (pĉk. 541.33)
Egiptujo	10	20	100	2/—	angl. ŝil.	Tadros Megalli, P.B. 1037, Alexandria
Finnlando	275	600	2750	50.—	f. mk.	J. Vilkki, Somero (pĉk 60253)
Francujo	240	500	2400	50.—	fr. fk.	J. Guillaume, Esp.-Oficejo, 34 rue de Chabrol, Paris 10
Germanujo ...	20	40	200	4.—	g. mk.	S-ino S. Jung, Hauptstr. 9, Horrem Bez. Köln
Hispanujo	22	45	220	5.—	pes.	F. Rivelles Giménez, Plaza de Tetuán 40, Castellón de la Plana
Hungarujo ...	24	48	240	5.—	for.	P. Balkanyi, Kreditbank, Budapest 507
Irlando	10	25	100	2/—	ŝil.	L. O'hUiginn, Sonas, Cnoc na hInneona, Dundroma-Dublin
Islando	10	20	100	2/—	angl. ŝil.	O.S. Magnusson, Bergstadastraeti 30 B, Reykjavik
Italujo	450	900	4500	75.—	liroj	L. Minnaia, Viale Giulio Cesare 223, Roma
Jugoslavio	100	200	1000	20.—	dinaroj	Ernest Kasovič, Gradska štedionica, Zagreb
Maroko	240	500	2400	50.—	fr. fk.	S-ino I. Fink, 3 rue Savorgnan de Brazza, Casablanca
Nederlando ...	5.50	11	55	1.—	guld.	Teo Jung, Scheveningen (poŝtmandate)
Norvegujo ...	10	25	100	2.—	n. kronoj	Norsk Esperanto-Forbund, Boks 942, Oslo
Nov-Zelando ...	10	20	100	2/—	angl. ŝil.	V.J. Leck, 189 Vivian Street, Wellington C. 2
Palestino	500	1000	5000	100.—	mil.	P. Lachowitzky, Kerem Quar, Jerusalem
Polujo	250	400	2500	50.—	zl.	R. Sakowicz, Asnyka 4, Warszawa-Okecie
Portugalujo ...	50	100	500	10.—	esk.	J. de Saldanha Carreira, Av. Grao Vasco 33 r/c., Benfica-Lisboa
Svedujo	9	18	90	2.—	sved. kr.	Förlagsföreningen Esperanto, Boks 19071, Stockholm 19
Svislando	10	20	100	2.—	sv. fk.	Otto Walder, Eigenheim, Romanshorn
Urugvajo	4	9	40	1.—	pesoj	P. Casas, Mercedes 927, Montevideo
Usono	2.50	5	25	0.50	dolaroj	D.E. Parrish, 328 West 46th Street, Los Angeles 37.
Aliaj landoj ...	10	20	100	2/—	angl. ŝil.	Heroldo de Esperanto, Scheveningen, aŭ: Int. Esp.-Ligo, Heronsgate, Rickmansworth, Anglujo